

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang



Nr. 5 Mai 1952

25-a SAT-KONGRESO

EN DUSSELDORF DE LA 2-a ĜIS 8-a DE AŬGUSTO 1952

Estas la unua fojo depost ekzisto de SAT, ke en nia urbo okazos SAT-Kongreso, kaj estas ankaŭ la unua fojo post la milito, ke ĝi okazos en Germanio.

Kvankam la ĉi-tiea SAT-rondo ne estas tre granda, ĝi volonte transprenis la nefacilan taskon, aranĝi la Jubilean Kongreson, kiu estas oficiale invitita de nia ĉefurbestro. La OKK konsistas el la kamaradoj Pillekamp, von Beesten kaj Ackermann. Ĉar estas nia Jubilea Kongreso, ni atendas, ke esperantistoj el en-kaj eksterlando multnombre aliĝas kaj ankaŭ partoprenos ĝin. Kiel kongresloko estas je nia dispono la granda konstruaĵo Rheinhalle (Rejnhalo), situanta tuj apud la Rejno. (Vidu la glumarkon kaj ilustritan poŝtkarton.)

Kio atendas vin, karaj gekamaradoj, en nia bela urbo, laŭ onidiro „Filino de Eŭropo“? Krom la labor-kunsidoj okazos ankaŭ frakcikunsidoj, en kiuj la respektivaj anoj povos preparoli siajn taskojn. Sed ne nur por labori vi venos al la Rejno. Ankaŭ por via distrado estas zorgata. Sabaton la 2. 8. estos la tradicia interkonatiĝa vespero. Ĝi do-

nos al vj la okazon saluti personajn geamikojn aŭ interkonatiĝi kun viaj ĝisnunaj nur per la korespondado konataj gekamaradoj.

La 3. 8. estos la solena malfermo. Ne nur salutos vin oficialuloj, ankaŭ granda kantunuigo salutos vin en nia lingvo. Meze de la Kongressemajno okazos nia „multkolora“ vespero. Pli ni ne volas malkaŝi.

Tuttaga ekskurso! Per trajno ĝis Kolonjo, kaj de tie per ŝipo al Andernach. Tie ni restos kelkajn horojn, liberaj je via dispono. Sammaniere ni reveturos. Ĉar ni sufiĉe frue devas scii la nombron de la partoprenantoj nepre respondu la demandon dorsflanke de la aliĝiloj.

Ankaŭ la junularo ni ne forgesis, samkiel ni ne forgesis la malgrasan monujon de niaj gekamaradoj. Je la maldekstra Rejnobordo, tuj kontraŭe de la Rejnhalo, ni volas instali tendaron. Se tio pro malhavo de tendoj ne estos ebla, tiam ni zorgos, ke granda lerneja halo estos je nia dispono. Do ankaŭ vi, geamikoj, ne disponantaj pri multe da mono, ne hezitu, aliĝu kaj venu. Ankaŭ nemultekostaj, ec senkostaj loĝejoj, limigite kompreneble, ni havos por niaj gekamaradoj rentuloj, invalidoj k. a.

La kooperativanoj kaj amikoj de la kooperativo havos le eblon viziti tri tiajn entreprenojn (sappabrikon, viandafabrikon kaj la konsumkooperativon). Per la vizito kaj dum la kaftrinkado vi povos vin informi pri ĉiuj sciindaĵoj el la kooperativa movado. La klarigojn dum la rondiradoj tra la uzinoj donos niaj kamaradoj esperantistaj.

Tre verŝajne vi povos ĉeesti la inaŭguron aŭ de Esperanto-Strato aŭ -Placo. Per via multombra partopreno pruvu, ke OKK ne troigis ĉe la oficialaj instancoj.

Cu ni ankoraŭ informu vin, ke ĉiuj viaj poŝtaĵoj, forsendotaj dum la Kongreso, portos esperantlingvan stampon?

Ankoraŭ gravaj informoj: 1. La malalta kotizo validas ĝis la 31-a de majo, 2. Respondu al via peto pri senkosta vizo ni ne jam ricevis, almenaŭ malaltigon de la nunaj kostoj ni esperas atingi.

Resume ni diru, ke OKK klopodas aranĝi ĉion tiel, ke ĝi estos inda al nia Jubilea 25-a. Ni estas certaj, ke 100-procento ni ne povos kontentigi, ĉar ĉio estas nur homfarado. Sed estu vi certaj, ke niaj gekamaradoj faros ĉion por agrabligi al vi vian restadon en la art- kaj ĝardenurbo Düsseldorf.

Tial, gekamaradoj, venu al nia Jubilea Kongreso!
OKK

Mallongaj sciigoj el la Verda Mondo

Esperanto-Kursoj en eksterlandaj gazetoj

Kun granda sukceso aperas Esperanto-kursoj en „De Typhoon“ en la nederlanda urbo Zaandam, en „Winschoter Courant“ en la nederlanda urbo Winschoten, kaj laste en „Nord-Eclair“ en la franca urbo Lille.

Esperanto-interpretistoj en Londono

Okaze de la pasintjara „Festo de Britujo“ deĵoris en Londono oficialaj interpretistoj ankaŭ por Esperanto. Ili portis specialan insignon verdkoloran kun la argentkolora surskribo „Esperanto“.

State subvenciata kurso pri Svedujo en Esperanto

En somero 1952 okazos en la alternejo Bohusgarden apud Göteborg (Svedujo) internacia kurso pri „La nuntempa Svedlando“. La prelegoj, nur en Esperanto, pri traktos ĉiujn modernajn sciindaĵojn pri Svedujo. La sveda registaro asignis por la aranĝo de ĉi tiu kurso subvencion de 4000 svedaj kronoj. Invitataj estas Esperantistoj el ĉiuj ekstersvedaj landoj. Informojn donas Sveda Esperanto-Instituto, Sibillegatan 85, Stockholm.

Islama misiisto el Pakistano,

s-ro Ghulam Ahmad Bashir, faris en Esperanto interesajn kaj ŝatatajn paroladojn pri sia hejmlando tra Nederlando, kie li nun vivas.

25 KONGRESO 25

2-8. AUGUSTO

SAT ★ 1952 ★



WK/102/11/2

vizitis SKANDINAVION

Laŭ invito de Esperanto-Federacio de Danaj Alifernejaĵoj, kies prezidanto Johs. Vesterland-Andersen en Januaro estis gastulo de la Studenta Esperanto-Klubo Freiburg, ok gestudentoj el Freiburg startis la 9an de Marto 1952 por studvojaĝo al Danlando kaj Svedujo. Tiu vojaĝo havis kiel celon peri al la partoprenantoj scion pri kulturo kaj socio en la du landoj, sed ankaŭ



Kvar sur la pramo Helsinöre-Hölsingborg

havigi al ili kontakton kun la studentaro kaj komenci amikecajn rilatojn inter la universitatoj de Skandinavio kaj Freiburg.

Por esti sendependa de fervojaj horaroj, la grupo elektis kiel transportilon du malgrandajn Renault-4^o CV-aŭtomobilojn. La unuan tagon ni venis ĝis Celle apud Hannover, kie ni tranoktis en la junulargastejo.

En la frua mateno de la dua vojaĝtago okazis apud Bergen ĉe Celle grava akcidento de unu veturilo, kiam ligna ĉaro, tirita de ekstimigitaj ĉevaloj, en granda rapideco veturis de apudstrato en la ĉefstraton. La du veturiloj interpuŝiĝis kaj detruigis. El la kvar studentoj en la akcidentinta aŭtomobilo tri vundiĝis: K. E. Ahrens (kondukanto), Alfred Zeller kaj Günther Biemer. Zeller havis rompiĝon de la krania bazo kaj estis dum la venontaj du tagoj en mortodanĝero. Biemer akiris cerbo-skuegon kaj tranĉvundojn sur la krania haŭto. Kiel per miraklo la kondukanto mem de la aŭtomobilo, Ahrens, akiris nur vundojn, kiuj resaniĝis dum la venontaj tri tagoj, tiel ke li povis daŭrigi la vojaĝon kun la aliaj.

Post certeco pri sanigebleco de Zeller ni daŭrigis la vojaĝon la 12an de Marto vespere, kaj veturis dum la tuta nokto ĝis Flensburg. Tie ni prenis je la kvara matene la kvinan partoprenanton kiu, pro pleneco de la restanta unu aŭtomobilo, devis veturi vagonare. Ni komune transiris la limon ĉirkaŭ la kvina matene kaj, veturante senhalte tra tuta Danlando atingis je

la kvara posttagmeze Helsinöre, kie la per vagonaro alveninta Ahrens jam atendis nin. Ni tuj per pramo transveturis la Sundon kaj post duona horo alvenis jam en Svedujo. Ni eksalutis niajn geamikojn en Lund kaj estigis tuj bona kontakto.

Car por la posta vespero ni estis anoncintaj en Stokholmo, 670 km for de Lund, ni startis en frua mateno por tiu longa distanco. Ni bedaŭrinde havis malfruigon de du horoj pro du eksplodantaj pneumatikoj. Apud Nyköping, je la sepa vespere, mankis kelkaj ŝraŭboj ĉe unu rado, kaj tiu riparigo daŭris du pliajn horojn. Fine la strato inter Nyköping kaj Stokholmo estis tiom glaci-glata, ke eblis veturi nur en rapideco de piediro. Tiel ni alvenis nur je la kvara matene en Stokholmo, sed estis despli kore akceptataj de s-ano Rosen kiu, kuŝanta mem sur planko, estis aranĝinta litojn por ĉiu en sia loĝejo.

Ni rapide faris niajn vizitojn al la Sveda Studenta Unuiĝo, al la Sveda parlamentejo kaj al la tiom bela urbo Stokholmo. Komprenoble ni vizitis ankaŭ la kulturalan sektion de la Germana Ambasadorejo en Stokholmo. En la frua vespero ni daŭrigis al la fama sveda universitatourbo Upsala kaj tranoktis. La venontan matenon, dimanĉon, ni estis akceptataj por tagmanĝo de la eksterlanda komisiono de la universitato, kiu tre interesiĝis pri studentaj problemoj en Germanujo kaj pri la studentaj demonstracioj kontraŭ Veit Harlan. Ekestis vigla pens-interŝanĝo pri la studenta mem-administrado. Post vizito al la tombejo de la svedaj reĝoj ni reveturis al Stokholmo kaj pasigis la posttagmezon rigardante la urbon kaj liberaeran muzeon Skansen.

Ĉe la reveturo ni ankoraŭ longe diskutis en Lund kun studentoj. Ni vizitis la romanidan katedralon, la studentan domon kaj la universifaton. Post reveturo al Hälsingborg ni sur pramo denove transveturis la Sundon. En Helsinöre vizito al la Hamlet-kastelo estis tre interesa. Post veturado laŭlonge de la „Dana Riviero“ ni atingis Kopenhagon. Johs. Vesterland-Andersen kaj aliaj membroj de la Studenta Esperanto-



En Röskilde ni perdis radon

Klubo Kopenhago elkore bonvenigis nin kaj ekde nun zorgis por ni. Dum la bedaŭrinde tro mallonga restado en Kopenhago ni devis multon vidi. Ni aŭskultis du interesajn prelegojn: unu pri la dana biblioteka sistemo de Brita Olsson kaj unu pri la dana lerneja sistemo de Poul Thorsen, ambaŭ fakuloj. En la „Esperanto-domo“ ni ĉeestis finfeston de studrondo Esperanta pri „interpopola konduto“. Dum nia veturo al Aarhus mallonge post Kopenhago ni perdis radon kaj atendis du horojn ĝis ĝia riparigo.

Ni volis alveni en Aarhus je la dua horo matene. Sed, ve, je la dua matene ni troviĝis en Vejle kaj ne povis pluveturi, ĉar akslagro difektigis. Do ni tranoktis en hotelo kaj alvenis, post matena riparigo de la difekto, je la dua posttagmeze en Aarhus. La tre interesan programon tie preparis por ni s-ro Poul Jørgensen. Tiu dutaga restado en Aarhus peris al ni vere multon: vizitoj al interesaj institucioj, socialaj aranĝoj, al la universitato kaj kontakto de la studentoj, kaj du vesperoj ĉe Esperanto-Klubo. Ĉie oni akceptis nin tre afable. Niaj partoprenantoj tiel ricevis, spite al la nur kelktaga restado, konon de la dana popolo.

Sed jam alvenis la tago de adiaŭo. Ni unue veturis al Celle, por vidi niajn du vunditajn kolegojn, Zeller fartis jam pli bone, kvankam li ankoraŭ ne reakiris la kapablecon flari aŭ gustumi. Ni rakontis al niaj kolegoj pri la vojaĝo kaj deziris al ili baldaŭnan resaniĝon.

Tiam ni reveturis sur la aŭtostrato rekte al Freiburg kaj dum granda pluvego revenis: lacegaj, sed kun multaj belaj spertoj pri du foraj landoj kaj ilia popolo, kaj kiu la konvinko, ke Esperanto ne nur estas lingvo, sed ideo liganta milojn da homoj al homara familio, preta helpi unu la alian. Michel Schmidt.

Printempo nun alvenis

„Der Lenz ist angekommen“
(Popolkanto)

Printempo nun alvenis!
Cu tion vi komprenis?
Anoncas ĝin de l' birdoj flor',
anoncas ĝin herbeja flor':
printemp', printemp',
printempo nun alvenis!

Rigardu la kamparojn,
rigardu la arbarojn!
Vok' de l' kukol', de l' fringo kant',
ĝojkrias ĉia nun vivant':
printemp', printemp',
printempo nun alvenis!

Jen floroj en herbejoj,
saŭdoj sur paŝtejoj,
ekĝojas ĉiuj en la rond',
ekestis bela nova mond':
printemp', printemp',
printempo nun alvenis!

Tradukis, E. Kre.

La Internacia Konferenco de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj

kiu okazos laŭ invito de Germana Esperanto-Junularo. ASTA-Freiburg kaj Studenta Esperanto-Klubo Freiburg de 17-24. 8. 1952 en Schluchsee, estos malfermata de la itala profesoro d-ro G. Canuto, rektoro de la universitato Parma. La japana biologo prof. d-ro E. Egami versajne ankaŭ partoprenos la konferencan.

Intertempe la prepar-laboroj por tiu konferenco bone progresis. En la konferenco partoprenos ĉirkaŭ 60 studentoj kaj altlernejoj, krom la referantaj profesoroj kaj sciencistoj. La konferenco pritrakto kiel ĉefpunktojn la sociajn problemojn de la studentaro en diversaj landoj, internacian studentan kunlaboron, kaj la fakon „scienco kaj Esperanto“, kaj oni do atendas frukto-donan laboron.

La aranĝantoj supozas ke, ĉar Ikesa kiel unua internacia studenta konferenco uzos Esperanton, la aranĝo multe interesos la germanan studentaron kaj tial povas havigi novajn adeptojn al la studenta esperantista movado.

En la kadro de la tre riĉa programo, oni montros ankaŭ plurajn filmojn en Esperanto, kiel ekz. „Ni obeigos la akvojn“ kaj „Danlando“. Krome okazos ekskurso al la monto Feldberg en la Nigra Arbaro, kaj punĉefesto.

La partopren-kostoj, ĉirkaŭ 60.—DM, estos versajne malaltigeblaj per subvencioj, pri kiuj klopodas ankoraŭ la prepara komitato. La partoprenantoj ricevos ankaŭ 50%-an fervojan rabaton.

Esperantistaj studentoj de universitatoj, altlernejoj, pedagogiaj altlernejoj ktp. estas alvokataj, anonci sin por eventuala partopreno por ilia universitato ĉe la germana preparkomitato: Ikesa, Konstanz, Gröngang 2.

Kleines Erlebnis durch Esperanto

Nach einem wahren Vorfall erzählt

Wir sind in einer größeren Stadt Nordwestdeutschlands. Langsam schlendern wir durch die Hauptgeschäftstraße. Helle Neonlichtreklame erleuchtet die breite Straße mit ihrem Trubel und zaubert auf die Augen der Passanten helle Lichter, die diese sonst nicht haben.

Mitten in diesem Treiben sehe ich zwei Menschen mit wirklich ganz hellen Augen und mit lächelnd sprechendem Mund. Ah, und ich kenne sie sogar. Es sind Herr und Frau Hoffmann, die nicht weit von meiner Wohnung ein reizendes, kleines Häuschen bewohnen. Richtig, daß ich's nicht vergesse, sie sind Esperantisten. Deshalb tragen sie beide einen silbergefaßten, kleinen grünen fünfzackigen Stern auf dem Mantelaufschlag. Soweit ich hörte und auch selber weiß, ganz reizende Leute. Da hat mich auch Frau Hoffmann schon erkannt. Sie winkt mir zu warten. Bald sind sie heran.

„Welch ein netter Zufall, Sie einmal wieder zu treffen“, beginnt Frau Hoffmann, „wie geht es Ihnen immer?“

„Danke, gut.“

„Uns auch, wie Sie sehen. Das besonders nach einem so erquicklichen Erlebnis, wie wir es eben hatten. Ach, ich bin noch ganz voll davon!“

„Was für ein Erlebnis, meine Gnädigste, war es denn, was Sie noch jetzt so bewegt?“ Nun war ich interessiert, denn eine Flachheit erwartete ich von diesen Leuten nicht.

„Mein Gatte möge es Ihnen kurz schildern, er kann das besser als ich!“

„Ach, es ist ein kleines, jedoch für uns vielbedeutendes Geschichtchen. Also meine Frau und ich machten heute einen Bummel durch unsere Stadt. Wir hatten dies und das zu erledigen und wollten uns auch noch verschiedenes ansehen. Mit einem Mal hält uns ein fremder Herr an und begrüßt uns, nach kurzer Entschuldigung, als Gesinnungsfreunde in einem klaren, flüssigen Esperanto. Sein Name war Dr. Sigi

Kaisen, und er weilte in unserer Stadt anlässlich des internationalen Mediziner-Kongresses, der ja drei Tage hier stattfand, wie Sie sicher auch wissen. Er hat uns an unseren grünen Sternchen erkannt.

Dann gingen wir drei gemeinsam des Wegs und führten eine sehr angeregte, interessante Unterhaltung in Esperanto. Nach einer Stunde allerdings rauchte mir offen gesagt der Kopf. Nicht wahr, Dorothee, dir ging es auch so?“

„Ja, ja, ich war recht erschöpft“, bestätigte da Frau Hoffmann, „ich spreche beinahe mühelos Esperanto und wie mein Mann immer sagt, auch gut. Aber wir hatten verschiedentlich sehr schwierige Themen. Da merkte ich, daß man sich nie genug vervollkommen kann!“

„Na“, fuhr Herr Hoffmann fort, „und dann sagte ich halt: Lieber Freund, bitte seien Sie uns nicht böse, doch es will in Esperanto nicht mehr weitergehen, vorläufig. Plaudern wir ein bißel deutsch. Darauf offenbarte mir dieser Herr, indem er mir seinen Paß hinhielt, daß er Däne sei und nur vergessen habe, das bei seiner Vorstellung hinzuzufügen. Er wäre absolut nicht böse, wollten wir deutsch sprechen, er jedoch verstände und spräche so gut wie nichts davon. Welch einen Eindruck das nun auf uns machte, bereits eine Stunde mit einem Ausländer gesprochen zu haben, ohne es zu merken! Na, ich brauche wohl nichts zu sagen.“

„Nein, lieber Herr Hoffmann, das ist nicht nötig, es ist mir schon durch die Begebenheit viel von und für Esperanto gesagt.“

„Abschließend möchte ich nur noch erwähnen, daß wir dann doch noch über eine Stunde mit unserem lieben Freunde sprachen, in Esperanto. Wir hatten unterdessen ein kleines Café aufgesucht, ohne an die vorherige Sprechmüdigkeit noch zu denken. Denn wir beide hatten ein für uns unvergeßliches Erlebnis.“

Alvin.

REVELO-Tag in Hagen i. W.

Die Esperantisten Nordrhein-Westfalens kamen am 3./4. Mai 1952 zu ihrem 7. „Kongreß“ nach dem Krieg in Hagen, der Großstadt des Märkischen Sauerlandes, zusammen. Schon am Samstag hatten sich viele eingefunden, um einen Ausflug in die reizvolle Umgebung zu machen; waldbedeckte, von Aussichtstürmen gekrönte Berge, die als Gegengewicht gegen die lärmgefüllten Industriebezirke des Landes so wohltuend und beruhigend wirken. Leider wurde aus dem vorgesehenen Ausflug nichts; ein starker Regen verwässerte die Freude. Ein kleiner Spaziergang wurde aber doch gemacht, und abends gab es im Tagungslokal „Westfaltenhof“ einen „lustigen Abend“. Viele heitere Darbietungen und Lied und Tanz gewährleisteten einen fröhlichen Tagesabschluß.

Am Sonntag, dem 4. Mai, vormittags, kamen dann die Teilnehmer bei prachtvollem Maiwetter wieder im Westfaltenhof zur Eröffnungsfeier zusammen. Ihre

besondere Note erhielt sie durch die Anwesenheit von Stadtdirektor Sasse und Verkehrsdirektor Dr. Bartels, die sich in treffenden Worten zu unserer Idee und Bewegung äußerten. S.ano Neumann (Hagen), der die Tagung leitete, fand stets die richtigen Worte in seinen Erwiderungen. Anschließend fand eine öffentliche Werbeveranstaltung in der Staatlichen Ingenieurschule statt, wo uns als Vertreter des Regierungspräsidenten in Arnsberg Herr Regierungsbaurat Börner auch im Namen der Ingenieurschule begrüßte. Ihre Bewegung und unser Institut, so sagte er etwa, berühren sich in einem Punkte ganz besonders: beiden geht es darum, Brücken zu schlagen zwischen den Völkern. Den Hauptvortrag hielt in bekannt breiter Weise Herr Dr. Woelk (Düren); Herr Lehrer Wingen (Köln), gab hierauf noch einige weitere Erläuterungen. Hoffentlich kann die Esperanto-Bewegung in Hagen eine Anzahl neuer Zugänge buchen!

Die Jahreshauptversammlung der Revelo ergab eine Wiederwahl des alten Vorstandes, dessen Tätigkeit allgemeine Billigung fand. Besonders erfreulich war der gute Kassenbestand, der für Propaganda und andere Aufgaben zur Verfügung steht.

Die Stadtverwaltung Hagen verdient volles Lob für die wertvolle Unterstützung der Tagungsvorbereitung. Ein weiterer Umstand, der dem Hagener Kongreß eine besondere Note verlieh, war die Anwesenheit unseres Bundesvorsitzenden, Herrn Dr. Ziegler.

Die nächste Tagung wird voraussichtlich im Herbst in Bonn stattfinden.

J. B.

Ni gratulas!

Ĉe la „Esperanto-Ekzamenkomisiono Wiesbaden“ sukcese faris samideano Josef Kühnel, telegrafa inspektoro, Wiesbaden, la 17an kaj 18an de aprilo la ekzamenon „kiel Esperanto-instruisto“.

—ch.

Aktuala Terminareto

Blaues Auge (Schlagmal) bluaĵo sub la okulo
Brandsalbe brulvunda unĝvento
eineieige Zwillinge unuovulaj ĝemeloj
Entwicklungsstörung evolu-perturbo
farbenblind kolorerara (selten wirklich -blinda)
Fernamt interloka telefoncentro. ~gespräch i. interparolo
Fernmelde/bauamt telekonstruoficejo. ~wesen -aferoj
fern-schreiben teleskribi. ~er -ilo. ~stelle -ejo
Fernsprechamt telefonoficejo. ~leitung -linio. ~linie -liniaro. ~netz -reto. ~stelle -ejo. ~vermittlung -centro
Fernverkehr (Tel.) interloka trafiko
Hauptanschluß (Tel.) ĉeftelefonoj
Heilpraktiker nediplomita kuracisto
Kohlehydrate karbonhidratoj. ~nwasserstoffe hidrokarbidoj
Krankenversicherung asekuro (bzw. -asocio) kontraŭ malsano
leicht positiver Befund iomete (oder malforte) pozitiva konstato
Mangelercheinung fenomeno de vitaminmanko. ~krankheit malsano pro vitaminmanko
Minderwertigkeitsgefühl sento de malsupereco. ~komplex komplekso de malsupereco
Mitesser (auf der Haut) komedono
nachtblind noktoblinda
Naturheilkunde naturkuracado
Nebenschluß (Tel.) neĉefa telefonoj
Nervenzusammenbruch nerva kolapso
Ortsamt loka telefoncentro. ~netz

l. telefonreto. ~verkehr (Tel.) l. trafiko.
Pferdekur, Roß~ barbara kuraco
Sauerstoffgerät, Atmungs~ oksigenaparato
Schneuzerrung trostreĉo. distordo de tendeno
Senkfuß platpiedo
sterilisieren steriligi
Telegraphenam telegrafoficejo
Überempfindlichkeitskrankheit malsano pro supersentemo. hiperestezia malsano
Verfolgungswahn manio de persekutigo
verschleppte Grippe neĉelentita. -kurac- gripo
Wechseljahre klimaktero
Weisheitszahn malfrua dento. saĝodento
werdende und stillende Mütter iĝantaj kaj nutrantaj patrinoj
Zahnkrone dentkrono (techn. = Zahnkranz!)
Zahnstein tartaro

La esprimojn pri telekomunikado en la supra listo sendis s-ro Kind, Bonn. Dankon! Hans Wingen.

Forgesita kalendaro

Ĝis antaŭ kelka tempo mi ofte foliis en la porkledebindita taglibro de mia praavino, mortinta komence de l' jarcento pasinta. Nun mi ne plu kapablas legi la mallertmane per malhelbruna inko skribitajn tekstojn, sed mi plue perceptas la mucidan kaj ŝman odorojn de la iom flaviĝintaj folioj, kies bonkvalita papero ŝajne neniam disfalos kaj polviĝos.

Miaj prageavoj loĝis en mia hejmurbo, tiamatempe mizera vilaĝeto, piede de monteto, kies supron kronas kastelruino. Ĝi vivis simple, malriĉe, trankvile, ĝis la franca revolucio kaj la sekvinta okupacio malserenigis la idilion de ilia estado. La taglibro rakontas pri faktoj, en-kaj elspezoj, travivaĵoj kaj eventoj en naivmodesta maniero. Por kamparanoj la brutaro ludas tre gravan rolon; oni pereus, se la dombestaj produktoj mankus, kaj mi komprenas la zorgojn de la laborrema praavino, legante ekzemple, ke la bovina mamo inflamis pro trablovo en la difekta stalo, ke la granda kaprino ree abortis, ke du laktŝafoj malsanetas pro favo, per kiu najbara virŝafino ilin estis infekinta, ke la nunjara porko malrapide grasiĝas, ke la vila-hirta ŝpico mordis la filon de l' judo S., al kiu la prageavoj ŝuldis monon ktp. Fine la bovino mortis sekve de timpanito, kaj la praavo, per piĉo kulturanta sian vitejon sur la deklivoj de l' monteto, vundis per hakilbato tiel grave la suron de unu kruro, ke li devis kuŝi enlite dum kelkaj semajnoj; intertempe la fortika praavino mem fosis kaj plantis ĝisnokte. Reveninte hejmen ŝi preparis manĝon por ambaŭ personoj kaj la bestoj, lumigis la kabanon per oleolampeto kaj bandagiis la putrantan sebumitan survundon de l' edzo.

Nu, tiu familiara babilaĵo interesos neniam, kaj mi volas reveni al la temo. Ni reprenu la taglibron kaj konstatu, ke mia praavino estas signinta la datojn en siaj notaĵoj laŭ la kutima maniero, sed iutage ŝi uzis alian metodon aplikante la novan kalendar sistemon de la franca revolucio. Akre ŝi plendas pro la malfacilaĵoj adaptigi sin al tiu stranga sistemo. Tamen, oni devis obei la leĝon kaj sekvi la ordonojn de la franca ŝtata administristo en Bonn. Jen mi legas: 18. Brumaire de la jaro VIII = la naŭan de novembro 1799. Ek de aŭtuno 1805 ŝi ree datas siajn memornotojn laŭ la Gregoriana kalendaro, ĉar Napoleono estis abolinta la revolucian kalendaron.

Kiel estiĝis tiu kalendaro? En 1793 la franca konvento estis decidinta, enkonduki novan kalendaron. La jaro I komenciĝis la 22an de septembro 1792. Oni prenis por ĉiu jaro 12 monatojn kun po 30 tagoj, krome 5-6 suplementajn tagojn (festotagojn) je la jarfino kaj ĉiukvarjare supertagon. Revoluciuilo, kiun oni senkapigis en 1794, estis kreinta belsonajn esprimojn por la monatomoj, kaj preninta ilin el agrikultura medio. Estas laŭvice: Vendémiaire, Brumaire, Frimaire, Nivôse, Pluviôse, Ventôse, Germinal, Floréal, Prairial, Messidor, Thermidor kaj Fructidor; en Esperanto: vinrikoltmonato, nebulmonato, rosmonato (ne rozmonato!), neĝmonato, pluvmonato, ventmonato, ĝermomonato, flormonato, herbejmonato, rikoltmonato, varmegmonato kaj fruktmonato. Kvankam la temo ne plu estas aktuala, oni devas koni la sistemon de la franca revolucia kalendaro, kiam oficialaj familiaj dokumentoj necesigas precizan datdifinon en Reĵlando ofte bezonatan.

M. Butin.

LINGVA KONSULTEJO

Respondo 21

Mirigis la antaŭrimarkoj al la demandoj 21 kaj 22 de H. Wingen. Ĉu vere oni tiel multe teoriumas en nia tempo? Interesiĝo pri gramatikaj aferoj ja ne estas nepre mallaŭdinda.

Mirigas ankaŭ la demando pri tradukado de -weise. En „Wir lernen Esperanto“ sur paĝo 23, sub cifero 1 oni legas, ke la adverbo (vorto kiu en germana lingvo i. a. povas finiĝi per -weise) havas ĉiam la finaĵon -e. Ion plian pri tio diri ŝajnas esti superflue.

Mirigis, fine, la demando pri „aboco“. Laŭ ĝia strukturo ĝi estas nura kunmetaĵo: oni do simple kaj racie diru: abocoo, abocooa, abocoi ktp. Abocce, aboci k. s., aŭdate aŭ legate, jam ne donas klaran komprenon pri la vortsignifo. — Cetere, kial harfendadi? Ni uzu simple alfabeto, kaj jam en neniu derivaĵo ekestas dubesenco. Red.

Respondo 22

Laŭ Zamenhofs opinio, la artikolo estas, por tiel diri, necesa malbonaĵo, ĉar ekzistas ja lingvoj, kiuj ankaŭ sen ĝi ne pereas. Do, kiam vorto per si mem estas tiel nemiskompreneble difinita kiel ekzemple okazas ĉe propraj nomoj, artikolo antaŭ ĝi ne estas necesa. — La propra nomo de la plej alta monto de Eŭropo estas Le Mont Blanc. La Monto Blanka, do en ĉi tiu kazo la artikolo estas parto de la propra nomo. Se, oni volus uzi ĉi tie la artikolon, oni devus racie diri: La La Monto Blanka, kio estus evidenta sensencaĵo. Red.

Antwort 23

Den angeführten Satz würde ich so übersetzen: Ĉiuj enloĝantoj estis registritaj, unualoke la infanoj; oder: Oni registris ĉiujn enloĝantojn, komencante ĉe (kun) la infanoj; oder: Ĉe la registrado de ĉiuj enloĝantoj oni komencis ĉe (kun) la infanoj; oder: Unualoke oni registris la infanojn ĉe la notado de ĉiuj enloĝantoj. A. B.

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netaŭgulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Naŭa daŭrigo)

Nun mi venis unue sur grandan, solecan erikojon, sur kiu estis grize kaj silente kiel en tombo. Nur tie kaj tie staris malnova, ruiniĝinta muraĵo aŭ seka, strange tordiĝinta arbeto; kelkiam noktobirdoj flugzumis tra la aero, kaj mia propra ombro senĉese glitis longa kaj malhela en la soleco apud mi. Oni diras, ke praantikva urbo kaj la sinjorino Venus kuŝas tie ĉi entombigitaj kaj ke la antikvaj idolanoj ankoraŭ nun supreniras kelkiam el siaj tomboj kaj en kvieta nokto vagas tra la erikejo kaj konfuzas la migrantojn.

Sed mi ĉiam iris rekte antaŭen, ne lasante timigi min. Car pli kaj pli klare kaj belege la urbo leviĝis antaŭ mi, kaj la altaj kasteloj kaj pordegoj kaj oraj kupoloj brilis tiel rave en la hela lunlumo, kvazaŭ efektive la anĝeloj en oraj vestoj starus ĉe la murdentoj kaj kantus tra la silenta nokto al mi.

Tiel do fine mi pasis unue preter malgrandaj domoj, poste tra belega pordo en la faman urbon Roma. La luno lumis inter la palacoj, kvazaŭ estus hela tago; sed la stratoj ĉiuj jam estis forlasitaj. Nur tie kaj tie ĉifonvestita ulo kuŝis kiel mortinto en la varmeta nokto sur la marmorsojloj kaj dormis. La fontanoj murmuris sur la silentaj placoj, kaj la ĝardenoj ĉe la strato intersuris kaj plenigis la aeron je refreŝigaj bonodoroj.

Dum ke ĝuste nun mi tiel vagas plu kaj pro plezuro, lunlumo kaj bonodoro tute ne scias, kien turni min, jen gitaro aŭdiĝas elprofunde el ĝardeno. Dio mia! mi pensas, eble la freneza studento kun la longa surtuto sekrete postkuregis min! Dume sinjorino en la ĝardeno komencis treege ĉarme kanti. Mi staris kvazaŭ tute ensorĉita; ĉar estis la voĉo de la bela sinjorina moŝto kaj la sama itala kanteto, kiun sufiĉe ofte ŝi estis kantinta hejme ĉe la malfermita fenestro.

Tiam subite la rememoro pri la bela iama tempo pezis tiom forte mian koron, ke mi estus povinta plori maldolĉe: la silenta ĝardeno antaŭ la kastelo dum frua matenhoru, kaj kiel tie mi estis feliĉega malantaŭ la arbeto, antaŭ ol la idiota muŝo flugis en mian nazon. Mi ne povis plu reteni min. Sur la orumitaj ornamaĵoj mi transgrimpis la kradpordegon kaj svingis min malsupren en la ĝardenon, el kiu venis la kantado.

Jen mi rimarkis, ke malproksime gracia blanka figuro staris malantaŭ poplo kaj unue rigardadis mirigite, kiam mi transgrimpis la kradajon, sed poste flugekuris subite tra la malhela ĝardeno al la domo tiom rapide, ke en la lunlumo oni preskaŭ ne povis vidi ĝin piedumi. „Jen ŝi mem!“ mi kriis, kaj mia koro batis pro ĝojo; ĉar mi tuj rekonis ŝin laŭ la malgrandaj, rapidaj piedetoj. Malbona estis sole tio, ke malsuprensaltante de sur la ĝardenpordego mi estis iom disartikiginta la dekstran

piedon; tial mi devis kelkfoje svingi la gambon, antaŭ ol mi povis postsalti ŝin al la domo. Sed tie ili estis fermintaj dume pordon kaj fenestrojn. Mi frapis tute modeste, aŭskultis kaj refrapis. Jen estis ne alie, ol kvazaŭ interne oni mallaŭte flustrus kaj kaŝridus; unufoje eĉ ŝajnis al mi, kvazaŭ du helaj okuloj elbrilegis inter la ĵaluzioj en la lunlumo. Poste ĉio subite reestis silenta.

Si ja ne scias, ke estas mi! mi pensis, eltiris la violonon, kiun mi portas ĉiam kun mi, promenadis kun ĝi tien kaj returne sur la vojo antaŭ la domo kaj ludis kaj kantis la kanton pri la bela sinjorino kaj ripetludis, plena de plezuro, ĉiujn miajn kantojn, kiujn iam en la belaj somernoktoj mi estis ludinta en la kastelĝardeno aŭ sur la benko antaŭ la impostista domo, tiel ke sonis transen ĝis la fenestroj de l' kastelo.

Sed nenio efikis; neniu moviĝis nek aŭdebligis en la tuta domo. Tiam fine mi enpoŝigis malĝoje mian violonon kaj kuŝiĝis sur la sojlo antaŭ la dompordo; ĉar mi estis tre laca pro la longa marŝado. La nokto estis varma; la florbedoj antaŭ la domo bonodoris agrable; fontano pli sabe en la ĝardeno interplaŭdis senĉese. Mi revis pri ĉielbluaj floroj, pri belaj, malhelverdaj, solecaj valoj, kie fontoj muĝis kaj iris riveretoj kaj multkoloraj birdoj mirige kantis, ĝis kiam fine mi forte ekdormis.

Kiam mi vekigis, la matenaero fluetis tra ĉiuj miaj membroj. La birdoj jam estis vekigintaj kaj pepadis sur la arboj ĉirkaŭ mi, kvazaŭ ili volus mistifiki min. Rapide mi saltekstaris kaj rigardis ĉiufanken. La fontano en la ĝardeno ankoraŭ senĉese plaŭdis plu; sed en la domo neniu sono estis aŭdebla. Mi rigardis tra la verdaj ĵaluzioj en unu ĉambron. Tie estis sofo kaj granda, ronda tablo, kovrita per griza tolo; ĉiuj seĝoj staris laŭ severa ordo kaj nedisŝovitaj ĉirkaŭe ĉe la muroj. Sed ekstere la ĵaluzioj estis mallevitaj antaŭ ĉiuj fenestroj, kvazaŭ la tuta domo estus jam nelogata dum multaj jaroj.

Jen vera terurego kaptis min pro la solecaj domo kaj ĝardeno kaj pro la hieraŭa blanka figuro. Ne rigardante plu returne, mi kuregis tra la silentaj laŭboj kaj irejoj kaj ree grimpis rapide supren sur la ĝardenpordego. Sed kiel ensorĉita mi restis tie sidanta, kiam subite de la alta kradaĵo mi rigardis suben en la belegan urbon. Tie fulmis kaj briligis la matena suno malproksimen super la tegmentojn kaj en la longajn, silentajn stratojn, tiel ke mi devis laŭte ĝojekkrui, kaj plena de ĝojo mi saltis malsupren sur la straton.

Sed kien turni min en la granda, fremda urbo? Ankaŭ la memoro pri la konfuza nokto kaj la itala kanto de la bela sinjorina moŝto moviĝis de hieraŭ ĉiam ankoraŭ en mia kapo. Fine mi eksidis

sur la ŝtonan fontanputon, kiu staris meze de la soleca placo, lavis miajn okulojn helaj per la klara akvo kaj kantis ĉi-kune:

Se mi birdeto estus,
mi scius ja, kion pepi,
kaj havus du flugilojn —
mi scius ja, kien strebi!

„Ej, gaja junulo, vi kantas ja kiel alaŭdo sub la unua matenradio!” jen diris subite al mi juna viro, alirinta al la fontano dum mia kanto.

Sed aŭdante tiel neatendite la germanan lingvon, mi sentis en mia koro same, kvazaŭ la sonorilo en mia vilaĝo sonus maltransen al mi en silenta dimanĉa mateno. „Estu kore bonvenanta, plej kara sinjoro samlandano!” mi kriis kaj saltis, plena de plezuro, malsupren de la ŝtona puto.

La juna viro ridetis kaj rigardis min de supre ĝis sube. „Sed kion do vi agas ĉi tie en Roma?” li demandis fine.

Tiam mi momente ne sciis, kion diri: ĉar ke ĝuste nun mi estis postsaltanta la belan sinjorinan moŝton, tion mi ne volis diri al li. „Mi vagas iomete”, mi diris, „por rigardi la mondon!”

„Ho tiel!” respondis la juna viro kaj lautekridis: „jen ambaŭ ni havas ja la saman metion. Guste tion faras ankaŭ mi, por rigardi kaj poste kopipentri la mondon.”

„Do pentristo!” mi gaje kriis: ĉar dume mi ekrememoris la sinjorojn Leonhard kaj Guido.

Sed la sinjoro ne lasis min paroli. „Mi opinias”, li diris, „ke vi kuniru kaj matenmanĝu apud mi: tie mi volas portreti vin mem tiel, ke estos ĝojige!”

Tio tre plaĉis al mi: kaj mi nun migris kun la pentristo tra la senhomaj stratoj, kie nur tie kaj tie kelkaj fenestroviroj estis malfermataj kaj nun du blankaj brakoj, nun vizaĝeto ankoraŭ dormplena elrigardis en la freŝan matenaeron.

Longtempe li kondukis min tien kaj tien tra multe da senordaj, mallarĝaj kaj senlumaj stratoj, ĝis kiam fine ni enplitis en malnovan, fumumitan domon. Tie ni supreniris malluman ŝtuparon, poste ankoraŭ alian, kvazaŭ ni volus supreniri en la ĉielon. Ni haltis nun sub la tegmento antaŭ pordo, kaj la pentristo komencis, kun granda vigleco, serĉi en ĉiuj poŝoj, antaŭaj kaj malantaŭaj. Sed hodiaŭ matene li estis forgesinta ŝlosfermi kaj lasinta la ŝlosilon en la ĉambro: ĉar — tion li rakontis al mi dumvoje — ankoraŭ antaŭ tagkomenciĝo li iris antaŭ la urbon, por rigardi la pejzaĝon dum sunleviĝo. Li nur skuis la kapon kaj puŝmalfermis la pordon per la piedo.

Jen estis longa, longa, granda ĉambro, tiel ke oni estus povinta danci en ĝi, se la planko ne estus estinta plena de ĉirkaŭkuŝantaĵoj. Sed tie kuŝis botoj, paperoj, vestoj, renversitaj farbopotoj, ĉio intermiksita: meze de la ĉambro staris grandaj stabloj, kiajn oni bezonas por deŝiri pirojn; ĉirkaŭe grandaj pentraĵoj estis apogitaj al la muroj. Sur longa, ligna tablo estis plado, sur kiu pano kaj butero kuŝis apud farbmakulo. Botelo da vino staris apude.

„Unue manĝu kaj trinku nun, samlandano!” kriis al mi la pentristo.

Mi do volis tuj ŝmiri kelkajn pantranĉaĵojn per butero: sed ho! ne ĉeestis tranĉilo. Ni devis

longan tempon serĉi inter la kraketantaj paperoj, antaŭ ol fine ni trovis ĝin sub granda pakaĵo. Poste la pentristo ŝirmalfermis la fenestron, tiel ke la freŝa matenaero gaje trapenetris la tutan ĉambro. Jen belega elrigardo malproksimen trans la urbon inter la montojn, kie la matensuno gaje surlumis sur la blankajn vilaojn kaj vitoĝardenojn.

„Vivu nia malvarmeta-verda Germanujo tie malantaŭ la montoj!” kriis la pentristo kaj trinkis el la vinbotelo, kiun poste li prezentis al mi. Gentile mi trinkis responde kaj salutis en mia koro ankoraŭ milfoje la belan hejmlandon en la malproksimo.

Sed la pentristo dume estis ŝovinta pli proksimen al la fenestro lignan trabojn, sur kiun tre granda streĉita papero estis surgluita. Sur la papero malnova kabano estis tre arte desegnita nur per grandaj, nigraj strekoj. En ĝi sidis la Sankta Virgulino kun treege bela, ĝojoplena kaj tamen tre melankolia vizaĝo. Ĉe ŝiaj piedoj, sur nesteto de pajlo, kuŝis la Jesu-infano, tre afabla, sed kun grandaj, seriozaj okuloj. Sed ekstere sur la sojlo de la nefermata kabano du paŝtisto-knaboj genuis kun bastonoj kaj poŝoj.

La sorĉo-lernulo

J. W. von Goethe

Tradukita de Paul Christaller †

1. Jus la sorĉo-majstro estas
fine for el nia domo!
Kaj spiritoj liaj devas
vivi nun laŭ mia volo.

Vorton, agon, ambaŭ
bone notis mi;
mi miraklos ankaŭ
mense tie ĉi.

Vagu! vagu
kelkan vojon,
ke ĉi-fojon
fluu akvo

kaj rapide nun plenigu
jenan kuvon por la bano.

2. Nun, malnova balailo,
prenu la servisto-rolon
— servis vi de longa tempo —
kaj plenumu mian volon!

Tuj du gambojn havu,
kapon sur la kol',
kun sitelo iru
nun laŭ mia vol'!

Vagu! vagu
kelkan vojon,
ke ĉi-fojon
fluu akvo
kaj rapide nun plenigu
jenan kuvon por la bano.

3. Al rivero jen li kuras;
vere! li ĝin jam atingis.
Fulmurapide li revenas,
vazon tuj li malplenigis.

Jen la dua fojo!
Svelas jam la kuv'!
Kiel ĉiu ujo
plenas de la flu'!

Staru! staru!
ĉar ni havas,
multe havas
da provizo!
Mi ekscias! Veo, haltu!
Mi forgesis pri la vorto!

4. Ho, la vorto, kiu emas
fari lin puriga ilo.
Ho, li kuras kaj revenas!
Ke vi estu balailo!

Ciam novajn fluojn
alen ŝutas li,
kiel cent riverojn
ĵetas li al mi.

Ne pli longe
mi toleros;
mi vin kaptos,
maliculo!
Mi suferas ja pli forte.
Ho, vi fia inferulo!

5. Ĉu la tuta nia domo
nun pereu per la fluo?
Ĉar eĉ super ĉiu sojlo
jam rivero fluas akvo.

Fia balailo
sen obea em'!
Vi iama ligno,
senmoviĝu mem!

Ĉu vi fine
ĉesos ne plu?
mi vin kaptu,
vin haltigos;
la lignaĉon mi sentime
per hakilo disfendigos.

6. Jen revenas li kun treaol!
Spertu, kiel mi atake
alferigos vin, koboldo!
La hakilo trafas krake.

Vere mi bontrafis!
Jen disigis li!
Bone mi sukcesis,
nun ekspiras mi!
Veo! veo!
ambaŭ pecoj
staras rektaj,
du servistoj
tute pretaj por laboro!
Helpu min, ĉiel-potencoj!

7. Ili kuras! kaj plenakvaj
estas ĉambroj kaj ŝtuparo:
kiaj fluoj teruregaj!
Aŭdu mian vokon, majstro!

Jen la majstro venas,
„Mi mizeras tro!
La vokitoj iras
ne plu ree for.”

„Al angulo
balailo!
Estu fino!
Tute certe
la spiritojn per postulo
nur la majstro vokas sperte.”

„Jen vidu”, diris la pentristo, „al la unu de la paŝtistetoj tie mi volas surmeti vian kapon. Tiel via vizaĝo do fariĝos iom konata inter la homoj; kaj, se Dio volas, ili ĝojos ankoraŭ pri ĝi tiam, kiam ni ambaŭ jam longe estos entombigitaj; kaj ili mem genuos antaŭ la Sankta Patrino kaj ŝia filo same trankvile kaj gaje, kiel jen la feliĉaj knaboj.”

Poste li ekprenis malnovan seĝon: sed kiam li volis levi ĝin, tiu lasis en lia mano la duonan dorsapogilon. Rapide mi rekunmetis kaj ŝovis ĝin antaŭ la trabojn, kaj nun mi devis sursidiĝi kaj turni mian vizaĝon iom flanken al la pentristo.

Tiel mi sidis kelkajn minutojn tute silenta kaj nemoviĝanta. Sed mi ne scias — fine mi ne plu povis elteni tion: mi sentis jukon nun tie, nun tie. Ĝuste kontraŭe de mi ankaŭ pendis rompiĝinta duona spegulo: en tiun mi devis senĉese enrigardi; kaj dum ke ĝuste li pentris, mi faris pro enuo ĉiajn fivizaĝojn kaj grimacojn. La pentristo, rimarkanta tion, fine laŭtekridis kaj faris al mi mansignon, ke mi reekstaru. Mia vizaĝo sur la paŝtisto ankaŭ jam estis finita kaj aspektis tiel klara, ke fine mi ege plaĉis al mi mem.

Li nun ĉiam diligente pludesignis en la matena

malvarmeto, kantante ĉi-kune kanteton kaj kelkiam elrigardante tra la malfermita fenestro en la belegan pejzaĝon. Sed mi dume detranĉis ankoraŭ buterpanpecon kaj iris kun ĝi tien kaj returne en la ĉambro kaj rigardadis la bildojn, starigitajn ĉe la muro. Du el ili precipe bone plaĉis al mi.

„Ĉu ankaŭ tiujn vi pentris?” mi demandis la pentriston.

„Ho, tute ne!” li respondis, „ili estas de la famaj majstroj Leonardo da Vinci kaj Guido Reni — sed pri tiuj vi ja nepre nenion scias!”

La fino de lia parolo ĉagrenis min. „Ho”, mi diris tute kviete, „ambaŭ majstrojn mi konas kiel mian propran poŝon”.

Jen li faris grandajn okulojn. „Kiamaniere?” li rapide demandis.

„Nu”, mi diris, „ĉu mi ne vojaĝis kun ili tage kaj nokte, per ĉevaloj kaj piede kaj per kaleŝo, tiel ke la vento fajfis ĉe mia ĉapelo, kaj perdis ilin ambaŭ en la gastejo kaj poste veturis sola en ilia kaleŝo ĉiam pluen per rapidpoŝto, tiel ke la diabla veturilo ĉiam flugis sur du radoj super la terurajn ŝtonojn, kaj —”

„Oho, oho!” interrompis min la pentristo kaj rigardis min fikse, kvazaŭ li kredus min freneza. Sed poste li laŭtekridadis, „Al!” li kriis, „nur nun mi komprenas: vi vojaĝis kun du pentristoj, nomigitaj Guido kaj Leonhard?”

Kiam mi jesis tion, li rapide saltkestaris kaj refoje rigardis min precize de supre ĝis malsupre. „Mi preskaŭ kredas”, li diris, „eble — ĉu vi ludas la violonon?”

Mi frapis sur mian frakpoŝon, tiel ke la violono en ĝi eksonis.

„Nu efektive”, diris la pentristo, „estis ĉi tie grafino el Germanujo, kiu en ĉiuj anguloj de Roma kolektigis informojn pri la du pentristoj kaj pri juna muzikanto kun la violono.”


„Juna grafino el Germanujo?” mi elkriis plena de raviĝo: „ĉu la pordisto kunĉeestis?”

„Ĉion ĉi mi ja ne scias”, respondis la pentristo: „mi nur vidis ŝin kelkfoje ĉe unu sia amikino, kiu tamen ankaŭ ne loĝas en la urbo. — Ĉu vi konas tiun ĉi?” li pludiris, subite en angulo suprenlevante folan kovrilon de granda pentraĵo.

Tiam estis en mi ne alie, ol kiam en malluma ĉambro oni malfermas la fenestrovirojn kaj subite la matena suno fulmglitas trans la okulojn: estis — la bela sinjorina moŝto! — Si staris en nigra velurvesto en ĝardeno kaj per unu mano levis la vualon for de la vizaĝo kaj rigardadis kviete kaj afable en vastan, belegan pejzaĝon. Ju pli longe mi rigardadis, des pli ŝajnis al mi, kvazaŭ estus la ĝardeno apud la kastelo, kaj la floroj kaj la branĉoj mallaŭte heliĝus en la vento, kaj malsupre en la profundo mi vidus mian inpostodometon kaj la landstraton malproksimen tra la verdaĵo kaj la Danubon kaj la malproksimajn blujajn montojn.

„Estas ŝi, estas ŝi!” mi kriis fine, rabkaptis mian ĉapelon kaj kuregis rapide tra la pordo, malsupren sur la multaj ŝtuparoj, kaj ankoraŭ aŭdis nur, ke la mirigita pentristo kriegis post mi, ke mi revenu ĉirkaŭ vespere: tiam eble mi povus ekscii iom pli.

(Daŭrigota)



Leonardo da Vinĉi
kiel li mem sin vidis
kaj desegnis en sia
maljunaĝo.

LA GRANDA

Leonardo

En la sama monato kaj preskaŭ je la sama tago, kiam nia Majstro mortis, naskiĝis antaŭ 500 jaroj en la suna sudo, en vilaĝo proksime al Florenco, alia majstro en la plej vera senco de l' vorto, geniulo kiun oni rajte kaj prave nomas inter la plej grandaj figuroj de la homaro: Leonardo da Vinĉi, pentristo, skulptisto, arkitekto, inĝeniero, esploristo kaj inventisto.

Sur multaj kampoj de la homa kulturo li produktis elstarajn verkojn. Pli ol 5000 manuskribitajn foliojn li postlasis, plejparte skribitajn per speco de malfacile legebla spegulskribo. Li faris natursciencajn esplorojn, kiuj nur post jarcentoj estis kompreneblaj. Li inventis la plej mirindajn maŝinojn tiel ekzakte elpensitajn, ke oni povis ilin konstrui en nia moderna tempo kaj montri en speciala ekspozicio. Li verkis jam pri la flugado de la homoj sur la bazo de la birda flugo, kiun li detale studis. Kiel inĝeniero li konstruis kluzojn, bastionojn kaj fortikaĵojn. En la arto li estis la pioniro de nova spirito, kiu alkondukis la kulminon de la renesanco.

En unua loko Leonardo sentis sin pentristo. En sia „Libro pri la pentro-arto“ li diris, ke li volis „rigardi en la bruston de la naturo kiel en

tiun de amiko“ kaj nomis la naturon „la instruantino de ĉiuj bonaj majstroj“.

Eminentaj historiistoj, Jakob Burckhardt, diras pri li, ke „liajn gigantajn konturojn oni eterne povos nur de malproksime senti“. Leonardo ja ne havis la bonŝancon plene disvolvi siajn senfinajn fortojn. Multajn verkojn li ne povis fini, aliaj estas detruitaj aŭ difektitaj, kaj tutan aron ni konas nur laŭ tiutempaj raportoj kaj atestoj.

Ciama malkvieteco kuŝis sur li. Ofte li ree lasis jam komencitajn verkojn por serĉi ankoraŭ pli perfektajn solvojn. Kiel esploristo li turnis sin de unu problemo al alia, ĉiam klopodante trovi ion pli novan, ion pli bonan. Same okazis en lia vivo. Preskaŭ daŭre li migradis inter Florenco, Milano, Romo kaj fine Francujo, kie li mortis la 2-an de Majo 1519 en kastelo Cloux apud Amboise.

Ĉiu verko, kiun li kreis, estis progreso, juĝite laŭ la antaŭaj. Ne multaj finitaj pentraĵoj restis de li, inter ili estas tiuj, kiuj montras lian plejan perfektecon: la „Sankta vespermango“ kaj „Mona Lisa“. La unua montras la momenton, kiam Kristo diris al la dekdu, ke unu el ili lin perfidos. Majstre li prezentis

la disĉiplojn en kvar grupoj ĉe la tablo kun signoj de plej granda emocio en plej diversa esprimformo, kaj Kriston kiel majestatan centron en la mezo.


La pentraĵo, bedaŭrinde jam tre difektitaj, troviĝas en la Milana kluastro S-ta Maria delle Grazie. Ankoraŭ ĝia impresio estas imponiga. La figuroj estas pli ol nature grandaj. La pentraĵo estas kreaĵo staranta super ĉiuj epokoj.

La „Mona Lisa“ montras al ni la unuan anime movatan prezenton de homo en plena majstreco. La enigma rideto ĉirkaŭ la buŝ-anguloj de la Florencanino montras la tutan sorĉon de la arto de Leonardo. J. B.

La amsagoj kaj la senkapuloj

Antaŭ jarcento kaj pli frue multaj naturamikoj kolektis la domojn de la bestaj arkitektoj, la helikoj kaj konkoj. Nun tio nur estas amataĵo imperiestra de la japana imperiestro, kiu havas la plej grandan kolekton, de la riĉulo Rothschild kaj de kelkaj nesuprajaj naturamikoj. Ekzistis ankaŭ kolektantoj de amsagoj de niaj vulgarej ĝardenkaj striohelikoj (helikso), kiuj estas reciproke pafataj de la ambaŭseksaj helikoj dum la interesa amludo en pluvaj majotagoj el la seksorgano je la kapo, ne por mortigi, sed por pligrandigi la seksoĝuon. Kia stranga ideo evoluigis la poŝon kun la fabrikitaj sagoj, kiuj konsistas el kalko. (Vidu desegnaĵon!). Kelkaj telerhelikoj (planorbo), kiuj estas ŝatataj por formangi la algojn de la vitroj de akvario, havas rudimentan poŝon kun restoj de sagoj. La telerhelikoj estas la familio de la terloĝantaj helikoj, kiu remigris al la akvo, al kiu remigras el ĉiu planto- kaj bestogento unu familio pro sopiro al la devenloko de ĉiu vivantaĵo.

La gento de la gastropodoj, t. e. ventropieduloj (helikoj kaj limakoj) kaj de la acefaloj, t. e. senkapuloj (konkoj), do entute la moluskoj estas tre praaj gentoj, kiuj ebligis vivi dum multaj evoluopokoj ĝis hodiaŭ. Kvankam la konkoj rezignis havi kapon, la fame konata pilgrimkonko, kiu estas uzata kiel cindrujo kaj kiel telero por raguo, evoluigis okulojn je la rando ĉe ĉiu volbajeto de la konko. La pilgrimkonkoj naĝas tra la akvo kiel papilioj, malfermante kaj fermante la du partojn de la konko kaj ŝatas formoviĝon same kiel la malrapidaj, sed tamen tre liberamantaj helikoj.



KONKRETA MUZIKO

Von Dr. Josef Zurek, Jüchen/Rhl.

Traduko de Joseph Sommer

Problemo estas por mi la kreskado de la marhelikoj kun ornamajoj aŭ kun granda ornamita aperturo, ĉar ĉi tiuj ŝtonaj domoj ja ne povas pligrandiĝi kiel gumajo kaj la aligo de novaj partoj al la aperturo, kiel asertas la fakuloj, ne estas por mi bone komprenebla. Rigardu nur la konatan tigro-porcelan-helikon (cipreo) aŭ la pelikanpiedon (desegnaĵo) kaj vi certe ankaŭ miros pri la mirinda kreskado kaj konstruado de la helikoj.

Naturamiko, ne plu ignoru niajn malgrandajn strangajn kaj belajn amikojn, kaj se vi volas kolekti iliajn belajn konstruaĵojn, ne mortigu ilin, vi trovos ilin ĉie en la bela naturo.

Rwlin Preibisch, Köln-Brück.

Tri suratoj el la korano

La 104a surato: La kalumnianto
Pro la nomo de l' indulgema kaj malsevera Dio!

1. Ve al ĉiu blasfema kalumnianto.
2. Kiu amasigas bienojn, pro la estonteco;
3. Li kredas ke bienoj faros lin senmorta!
4. Kontraŭe! Suben li falos en Hotamato'n.
5. Sed kio igas cin kompreni, kio estas Hotamato?
6. Ĝi estas flamanta fajro de Dio.
7. Leviĝas super homaj koroj.
8. Estante kvazaŭ arkokonstruaĵo.
9. Sur altaj kolonoj — — —

La 107a surato: La rifuĝo
Pro la nomo de l' indulgema kaj malsevera Dio!

1. Ĉu vi vidis tiun, kiu neas pri la juĝtago?
2. Li forpeliĝis de si la orfon.
3. Kaj instigas nenium, doni manĝaĵon al malriĉuloj.
4. Tial: Ve al tiuj preĝantoj.
5. Kiuj estas malfervoraj malgraŭ sia preĝado.
6. Kiuj volas nur esti rigardataj.
7. Sed ne donas rifuĝon al iu ajn.

La 109a surato: La senkreduloj
Pro la nomo de l' indulgema kaj malsevera Dio!

1. Parolu: Ho vi, senkreduloj.
2. Nek mi adoras, kion adoras vi.
3. Nek vi adoras, kion adoras mi.
4. Nek mi adoras, kion adoris vi.
5. Nek vi adoras, kion adoras mi.
6. Vi havas vian kredon, mi havas la mian.

El la Araba tradukis R. Sprotte (1908).

La neagrabla tipo

Laŭdire Milana gazeto konstatis, ke la sekvantaj ok virinaj tipoj ne plaĉas al la viroj:

1. Dunaskitinoj, ĉiam same vestitaj.
2. vidvinoj, daŭre parolantaj pri sia „mortinto“.
3. la snob-tipo, kiu antaŭvideble estos malbona kamaradino.
4. la sandviĉ-tipo, kiu sin algluas al la viro.
5. la „Susi“-tipo, kiu ĉiam ludas la rolon de pupo.
6. la medicin-tipo, kiu senĉese havas migrenon.
7. altstaturaj virinoj, portantaj surstrate pantalonojn.
8. knabinoj, kies frato estas amatora aŭ profesia boksisito.

Kürzlich war im Rundfunk eine Sendung zu hören (richtiger, nicht anzuhören!), die als „konkrete Musik“ ausgestrahlt wurde. Von wo her dies geschah, ist dem Verfasser nachstehender Zeilen nicht mehr genau erinnerlich. Es ist auch belanglos. Jedenfalls aber stammte der „Genuß“ aus dem europäischen Raum. Man hatte aufs neue das erschütternde Erlebnis von dem geistigen, moralischen und kulturellen Tiefstand unseres anscheinend nicht mehr gesegneten oder von Gott gar verworfenen und zum Untergang bestimmten Erdteils. Was da Musik genannt wurde, hat nicht den geringsten Anspruch auf diesen auszeichnenden Namen. Gute Musik will doch wohl edelste Saiten in uns anrühren, will uns sogar innerlich erfassen und emporheben. Sie bedient sich dabei durch Tradition geheiligter, zuchtvoller Formen, in denen sie uns ihre Melodien und Harmonien nahebringt. Zweifellos kann auch die Kunst der Musik nicht bei dem Erreichten stehenbleiben und nicht auf eine Weiter-, vor allem aber Aufwärtsentwicklung verzichten. Jeder Musikfreund wird deshalb gerne bereit sein, Neues auf dem Gebiete der Musik anzuhören, um es dann anzunehmen oder auch abzulehnen. Er besitzt ja wirklich zuverlässige Maßstäbe für die Bewertung, wenn er die genialen, gotterfüllten Kompositionen unserer größten Meister zum Vergleiche heranzieht. Ein Bach, Beethoven, Mozart, Haydn, Händel und noch andere haben Ewigkeitswerte geschaffen, die zumindest von der lebenden Generation kaum noch einmal erreicht, geschweige von ihr überboten werden können. Aber auch ohne bewußte direkte Gegenüberstellung des Neuen und des Alten dürften wahrhaft empfindsame Ohren und nicht zuletzt Herzen, die doch maßgebend durch das vorhandene, in fruchtbarer Jahrhunderten angesammelte musikalische Gut Europas gebildet worden sind, ganz von selbst zu einem gesunden Urteil über den Wert oder den Unwert des Neuen, hier der „konkreten“ Musik, kommen. Jedenfalls ist es bedauerlich wahrzunehmen, daß manche moderne Töne- oder Geräuschemacher, die sich in Selbstüberschätzung Komponisten nennen, gar kein Empfinden mehr haben für das, was vor ihnen Großes geschaffen worden ist. Ehrfurcht vor solcher Größe ist ihnen gänzlich fremd. Ihnen fehlt wahrhaft jeder göttliche Funke. Sie werfen die hochkultivierten Klänge von Orgeln, Streich- und Blasinstrumenten, kurz alle obligaten klassischen Konzertmittel sozusagen zum Gerümpel und erdreisten sich, die schon hinreichend geplagten Menschen in deren Mußestunden mit einem voll Anmaßung als Musik bezeichneten Lärm zu unterhalten, der entsteht, wenn Maschinen brummen, surren, sausen oder rattern, wenn Kreissägen arbeiten,

Antaŭ nelonge estis aŭdebla (pli ĝuste: ne aŭdinda!; iu radio-dissendaĵo, kiun oni etikedis „konkrete muziko“. De kie ĝi venis, mi jam ne precize memoras. Ankaŭ estas negrave. Sed certe la stacio, kiu regalis nin per tia ĝuaĵo, estis eŭropa. Denove oni spertis kun amara bedaŭro kaj ĉagreno la tre malaltan nivelon de la spirita, etika kaj kultura vivo sur nia kontinento, kiu laŭŝajne ne plu estas benata de Dio, aŭ eĉ malfavorata kaj destinita por pereji. Kion jen oni nomis muziko, neniel rajtas pretendi tiun distingitan titolon. Bona muziko ja volas tuŝi en nia interno plej noblajn kordojn, volas eĉ kapti kaj edifi nian animon. Ĝi uzas por tio difinitajn artismajn formojn, sankciitajn de la tradicio, laŭ kiuj ĝi prezentas al ni siajn melodiojn kaj harmoniaĵojn. Estas vere, ke ankaŭ la muzikarto ne devas haltadi sur la ŝtupo atingita kaj ne rezigni pluan elvolvigon pli alten. Ciu muzikamanto sekve inklinos, aŭskulti novaĵojn sur la kampo de la muziko, por ilin aŭ akcepti aŭ rifuzi. Li posedas ja vere fidindajn kriteriojn por sia juĝado, se li komparas ilin kun la geniaj, de Dio inspiritaj komponaĵoj de niaj plej grandaj majstroj. Bach, Beethoven, Mozart, Haydn, Händel kaj aliaj kreis eternajn valorojn, kiuj apenaŭ iam ajn estos denove atingataj aŭ, eĉ malpli, superataj, almenaŭ ne de la nun vivanta generacio. Sed ankaŭ ne konseie kontraŭmetante la novon rekte al la malnovo, tamen vere sentemaj oreloj aŭ — pli trafe dirate — animoj, edukitaj per la ekzistantaj, dum pli fekundaj jarcentoj akumulitaj muziktrezoroj, venos de si mem al ĝusta juĝo pri la valoro aŭ nevaloro de la moderna, ĉi tie nomata „konkrete“ muziko. Ĉiukaze oni kun bedaŭro konstatas, ke iuj modernaj inventistoj de fitonaroj kaj bruoj, tromemŝate nomante sin komponistoj, perdis ĉian ŝatkapablon por la grandioza, kio estas kreita de la antaŭuloj. Sed respekto antaŭ tia grandeco estas al ili tute fremda. Vere mankas ĉe ili ĉiu dia inspiro. Ili kvazaŭ forĵetas sur la rubejon la altkultivatajn sonojn de orgenoj, arĉ- kaj blovinstrumentoj kaj impertinentas, regali la sen tio jam sufiĉe turmentatajn homojn dum ties liberaj horoj (sub la aroga pretendo, ke tio estas muziko) per bruado, kiu estas aŭdata, kiam maŝinoj zumegas, muĝas, knaras kaj krakadas, kiam motorsegiloj grincas, kiam infanoj krias, katoj miaŭas aŭ hundoj hurladas. El ĉio ĉi ili aŭdigas arbitre kunigitan,

La plej bela, la plej bonkonduta, la plej bona infano

De J. R. Harrer

Kiam mi hodiaŭ, meze de bela verdaĵo kaj de junaj virinoj, sidis en parko, al mi subite venis ekkono: Mi scias nun, de kie originas la uzado de la superlativo: ĝi devenas de la virinoj, pli ĝuste dirite de la patrinoj. Mi aŭskultis, kiel la junaj patrinoj parolis inter si pri siaj infanoj. Mi aŭdis:

— Mia Joĉjo vere estas la plej obeema infano!

Joĉjo staris en la herbejo, deŝirante foliojn de arbusto; kiam la patrino lin vokis, ĉar la policisto venis, Joĉjo faris grimacon kaj daŭrigis deŝiri kun pliiĝita fervoro.

— Mia Erĉjo estas la plej bonkora infano en la mondo!

Ce la vojrandoj kaŭris Erĉjo, distranĉante per sia ŝovelileto lumbrikon en malgrandajn pecojn.

— Mia Irenjo estas la plej bone edukita infano!

Irenjo staris antaŭ la patrino, borante en sia nazo, kaj uzante por tio eĉ du fingrojn, la etfingron de la maldekstra kaj la dikfingron de la dekstra.

Kaj tiel plu babiladis la junaj belaj patrinoj kun ĉielecaj okuloj.

— Mia infano estas la plej bela, plej bonkonduta, plej bona infano!

Mi leviĝis por ekpreni lokon je la alia fino de la parko, sur benko, sur kiu jam sidis juna fraŭlino. Ni ekkonversaciis.

Mi opiniis:

— Estas kortuŝe, kiel plej laŭde

la patrinoj parolas pri siaj infanoj. Ĉiu havas nur la superlativon en sia lingvoprovizo. Preskaŭ oni estas tentata imiti la patrinojn! Mi povus nun diri, ekzemple, eĉ ne troigante: „Mi havas la plej grandan feliĉon sidi apud la plej bela fraŭlino de Vieno.“ Kial vi ridas?

— Tial ĉar mi ne estas fraŭlino. Mi estas edzino kaj krome vi vidas en mi patrino. Kaj mi povas diri: la plej feliĉa patrino de la plej bela, plej bonkonduta, plej bona infano ekzistanta.

— Ĉu vere? mi demandis scivole.

— Kaj kie ĝi estas?

Dum mi ĉirkaŭrigardis serĉante, la juna virino ruĝiĝis. Mallaŭte ŝi respondis:

— Post kvin monatoj ĝi naskiĝos.

Tradukis Jrb.

KONKRETA MUZIKO

wenn Kinder schreien, Katzen jammern und Hunde heulen. Von all dem bringen sie ein wahlloses, wildes Gemisch zu Gehör und geben es kühn als Kompositionen „konkreter Musik“ aus. Melodie, Harmonie und Rhythmus, also Wesensbestandteile dessen, was den Namen Musik verdient, sind ihnen offenbar völlig unbekannt oder gleichgültig, vielleicht sogar verhaßt. Was auf diese Weise zustandekommt, ist eine Beleidigung für jedes musikalische Ohr; mehr noch: es ist eine Verhöhnung des christlichen oder doch religiösen Menschen schlechthin. Dieser ist von der ihn umgebenden Schöpfung her, deren Teil er ist, an Maß und Ordnung gewöhnt und verlangt sie normalerweise auch in allen geschöpflichen Lebensäußerungen, sofern er sich nicht bewußt dazu bekennt, die Auflösung und das Chaos zu wollen. Wenn das, was die „konkrete“ Musik ausdrückt, eine umfassende Verlautbarung des europäischen Seinszustandes wäre, dann würde durch sie ausgesagt, daß es sich nicht mehr zu leben lohnt.

Es ist die Zeit gekommen und reichlich Anlaß gegeben, gegen solche nihilistischen Tendenzen im Königreiche der Musik namens der großen Genien dieser hehrsten Kunst und auch in eigenen Namen mit aller Entschiedenheit feierlich Verwahrung einzulegen. Wir dürfen und wir wollen nicht mehr dulden, daß die heiligen Tempel der Musik weiter geschändet und schließlich atomisiert werden. Nach unserer unbeirraren Überzeugung gehören Bachs „Matthäuspassion“, Beethovens „Missa solemnis“, Händels „Messias“, Haydns „Schöpfung“ und ähnliche gleichrangige Werke zu dem Kostbarsten, was die Erde besitzt. Wir machen uns schuldig, wenn wir diese Himmels Gaben nicht hüten wie unseren Augapfel. Die „konkreten“ Machwerke einer völlig entarteten „Kunst“, wie sie uns in der erwähnten Radiosendung vorgetragen wurden, sind aber ein Angriff auf das, was wir zu schützen haben. Wenn wir es preisgeben, können wir uns nicht mehr zu der species homo sapiens rechnen, sondern zählen zu der Gesellschaft der Zweibeinigen, die „konkrete Musik“ fabrizieren. Sie ist und bleibt ihrem Werden nach handfester (konkreter) Mißwuchs. Ihrem Sein nach ist sie Abfall von allem Guten, ist Diabolie und als solche schon gerichtet.

sovaĝan miksaĵon kaj senĝene nomas tion komponaĵo de „konkrete muziko“. Melodio, harmonio kaj ritmo, ja esencaj elementoj de tio, kio pravigas la nomon muziko, evidente estas nekonataj de ili, aŭ ili rilatas al tio indiferece kaj eble eĉ malŝate. Kio tiamaniere fariĝas, ofendas ĉiun vere muzikeman orelon, eĉ pli: ĝi nete estas mokinsulto al kristana aŭ alimaniere religiema homo. Ĉi tiu, konforme kun la kreitaĵaro lin ĉirkaŭanta, kies parto li estas, kutimiĝis je deca mezuro kaj ordo, kaj normale li postulas ilin ankaŭ de ĉiaj manifestadoj de la kreitaĵo vivo, se li ne konscie celas la disolvigon de la ordo, do la liaoson. Se tio, kion esprimas la t. n. „konkrete“ muziko, estus signifa manifestajo de la eŭropa etika menseco, ĝi konigus, ke la vivo ne estas plu vivinda.

Venis la tempo kaj ekzistas plensufiĉe da kaŭzo, por energie kaj insistite protesti kontraŭ tiaj sovaĝaj tendencoj de barbareco en la reĝa regno de la muziko, kaj en la nomo de la grandaj geniuloj pri tiu sublima arto, kaj en la propra nomo. Ni ne darfus kaj ni ne volas plu toleri, ke la sanktaj temploj de la muziko plue estas profanataj kaj fine destruitaj. Laŭ nia firma konvinko la Mateopasiono de Bach, la Missa solemnis de Beethoven, la Mesio de Händel, la Genezo de Haydn kaj ceteraj samrangaj verkoj apartenas al la plej valora, kion la homaro posedas. Ni kulpigus, se ni ne gardus tiujn donacojn de la ĉielo kiel niajn okulglobojn. Sed la „konkretoj“ fiverkaĵoj de plene degenerinta „arto“, kiuj estis prezentataj per la dirita radio-elsendo, estas atako al ĉio, kion ŝirmi estas nia devo. Se ni ĝin perfidus, ni plu ne rajtus kalkuli nin al la speco homo sapiens, sed apartenus al la kategorio de tiuj dupieduloj, kiuj produktas „konkretan muzikon“. Ĉi tiu laŭ sia fariĝo estas kaj restas evidenta (konkrete) fuŝverkaĵo. En sia esenco ĝi estas perfido de ĉio bona kaj nobla, ĝi estas diablaĵo, kaj tial ĝia verdikto jam dirita.

Pensoj kaj deziroj

el inter nia legantaro

I.

Mi havas ankoraŭ unŭ peton pri EP:

Kiam eblus, bonvolu presigi la novelojn, rakontojn ktp. sole sur unu folio sen aldono de aliaj artikoloj, pro tio ke mi kolektas la novelojn ktp. kaj ĉiun alian artikolon speciale. Mi opinias, ke tio estas la deziro ankaŭ de aliaj abonantoj.

Kurt Festner.

Rim. de la red. Laŭ teknika vidpunkto via deziro kaj kialoj ne estas plenumebles. Sed ekzistas solvo: Abonu du numerojn de EP, tiam vi povos ĉiam distondi unu kaj kolekti ĉiun artikolon ktp. aparte. Se la kosto por 2 abonoj estas por vi tro alta, vi povos eble ricevi la duan ekzempleron de amiko, kiu post legado formetas la EP-numerojn.

II.

Mi deziras

a) priskribon de aŭtomato, laŭeble kun bildoj;

b) sciigon, kie kaj kiam Esperanto estis malpermesata.

Hans Wingen.

Rim. de la red. Ni konfesas, ke momente ni ne povas plenumi la ĉi-suprajn dezirojn. Eble troviĝas, por respondi al a), fakulo inter nia legantaro.

Al b): Versajne estus necesa tutmonda enketo. Sed eble la oficejo de UEA jam povas liveri tiun informon.

Ridū kaj estu gajaj!

Humor

„Das Mädel, das ich einmal heiraten werde, muß Sinn für Humor haben!“

„Da sei mal unbesorgt, alter Junge, wenn sie dich nimmt, hat sie bestimmt Sinn für Humor!“

Bonhumoro

„La knabino, kiun mi iam edziniĝos, devos havi komprenon por bonhumoro.“

„Nu, pri tio ne timu, mia knabego, se ŝi prenos vin kiel edzon, ŝi certe havos komprenon pri bonhumoro.“

Fürchterlich

„Ist es nicht fürchterlich, daß in der Welt so viele Lügen und Unwahrheiten geredet werden?“

„Ach was, es wäre doch viel schlimmer, wenn alles stimmen würde, was man so zu hören bekommt!“

Terure

„Cu ne estas terure, ke en la mondo estas parolataj tiom multe da pensoj kaj malverajoj?“

„Malgrave! Estus ja multe pli malbone, se ĉio estus vera, kion oni aŭdas!“

Freŝbakita edzo

skribas jenan leteron: Estimata s-ro N. Mi eksciis, ke antaŭ mia edziĝo vi intime rilatis al mia nuna edzino. Tial mi devas peti vin, ne plu viziti mian domon. Estime B.

La respondo komenciĝis per la vortoj: Danke mi konfirmas la ricevon de via ĉirkulero...

Du fraŭlinoj

en Usono pretigas sin por eliro kun siaj amikoj. Unu diras al la alia: „Mia amiko ĉiam diras, ke li amas min tia, kia mi estas. Nun mi devas atenti, ke mi estas tia, kia mi ĉiam estas.“

Antaŭ la profesikonsilanto

de la laboroficejo sidas kvar personoj; li momente esploras ilian kompren rapidon. Li diras: „Mi nun montrus rapide al vi objekton, kaj vi devos poste diri al mi, kion vi pensis en la momento de la ekvido.“ Ĉe tiuj vortoj li rapide eltiras el post sia dorso martelon kaj falĉilon, kaj tuj ree malaperigas ilin. Poste li demandas la unuan: „Nu, pri kio vi pensis?“ „Pri forĝejo.“ La profesikonsilanto kapjesas kaj sin turnas al la dua. „Pri la Sovjetunio.“ „Jes! Kaj vi?“ La tria ridetas kaj diras: „Mi pensis, ke vi volas montri al ni unu objekton, sed vi ja montris du!“ „Tre bone“, respondas la oficisto kaj sin turnas al la lasta, blonda junulo. „kaj pri kio pensis vi?“ „Pri Cecile Aubry.“ „Nu!“ respondas mirigite la ekzamenanto, „sed kiel povas esti, ke ĉe la vido de martelo kaj falĉilo vi pensas pri Cecile Aubry?“ Kun melankolia ĝemeto la junulo respondas: „Mi pensas ĉiam pri Cecile Aubry.“

dagegenhält — es waren größtenteils umfangreiche Artikel mit ins Auge fallenden Überschriften und teilweise sogar mit Bildern — so sieht man, wie wirtschaftlich der EGS arbeitet. Die Anlage 2 gibt eine genaue Liste aller Zeitungen und Zeitschriften im Revelo-Gebiet, die Esperanto-Beiträge veröffentlichten, und die Zahl und Art der Veröffentlichungen. Den Esperanto-Press-Dienst (EGS) verwaltet Herr Mathieu Schumacher, Köln. Jfb.

Esperanto-Kongres-Valso. Muziko: Peter Schwarz. Propraĵo: Aŭstria Esp.-Federacio, Landa organizo Tirol. Hans Steiner, Wörgl. Vier Seiten 30 × 23,5 cm. Preis nicht angegeben.

Da ich selbst nicht Klavier spielen kann, ließ ich ihn mir mal vorspielen, habe aber leider seine Melodie nicht so gleich behalten können. Nur einige Takte aus der Hymne, die ihn fortissimo einleiten, sind mir in Erinnerung geblieben, ferner, daß es ein Konzertwalzer ist, sich also weniger zum Tanzen eignet. Aber ich bin überzeugt, daß dieser Esperanto-Kongresswalzer bei unsern musikbeflissenen Gesamtdenonj als Kohzertstück Anklang finden wird. Mm.

Fakturo

de lavmaŝin-riparisto.

Ce via lavmaŝino mi fiksis unu ŝraŭbon 0,15 gm
sciis kie 4,00 gm
Sumo 4,15 gm

Ho, tiuj kuracistoj!

Foje, kuracisto diris al juna sinjorino:

Via edzo bezonas trankvilan vivon; tial mi receptas ĉi tiun medikamenton.

Kiom da fojoj mi devas doni ĝin al li?

Pardonu, sinjorino, la medikamento estas por vi mem.

Mortanton, kiu ankoraŭ havis sian konscion, kuracisto konsolis kaj konsilis:

Pardonu ĉiujn, kiuj malutilis al vi! Mi pardonas vin, doktoro, respondestertorante la mortanto.

Doktoro, ĉiam, kiam mi vidas vin, mi memoras, ke mi ŝuldas al vi la vivon.

Kaj... pri la honorarioj vi ne memoras?

Cu la kuracistoj interkonsentis en la konsultoj?

Jes, absolute! Ĉiu el ili postulis la saman honorarion.

Tri el miaj klientoj plene resanigis en ĉi tiu semajno

Kompreneble! La tutan tagon vi sidas en kafejoj!

Pliaj medicinaj ŝercoj

„Mi ja venigis vin, sinjoro doktoro“, diris malsanulo al kuracisto, „sed mi ne kredas al la moderna medicino.“

„Tute ne gravas“, rediris la kuracisto, „azeno ankaŭ ne kredas al la veterinaro kaj tamen estas kuracata.“

Famkonata psikiatro estis invitita de kulturunuigo en iu urbo pro prelego. Antaŭe okazis granda festeno en la unuigo.

„Diru, tre estimata sinjoro profesoro“, demandas la prezidanto, „kiamaniere do vi konstatas, ĉu iu estas mense malsana?“

„Tio ne estas tro malfacila. Ni faras kelkajn facilajn demandojn, kiujn povas respondi ĉiu normala homo.“

„Ekzemple?“

„Ekzemple tiel proksimume: Sipkomandanto Cook entreprenis tri mondvojaĝojn, kaj dum unu el ili li mortis. Dum kiu?“

La prezidanto de la kulturunuigo sulkigas la frunton priprensante, poste diras kun embarseto:

„Cu vi ne povas elekti alian ekzemplon? En historio miaj konoj ne estas tre grandaj.“

„Sinjoro direktoro, la interpretisto estas aŭtomobil-akcidente trafita — li perdis la parolpovon!“

„Terure, sed por kiu lingvo?“

Auf dem Büchertisch

Einzel eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Raporto por la jaro 1951 de la Esperanta Gazetaro-Servo (Köln). Fünf hektographierte Seiten in enger Maschinenschrift, Format Din A 4 mit zwei Anlagen gleichen Formats.

Dieser ausführliche Jahresbericht des Pressedienstes der Esperanto-Vereinigung Groß-Köln, und des Rhein-Westfälischen Esperanto-Verbandes erschien anlässlich der Jahreshauptversammlung der Kölner Gruppen, und des Rhein-Westfälischen Esperanto-Verbandes in diesem Jahr. Er gibt eine ausgezeichnete Übersicht über die Tätigkeit dieses Pressedienstes (EGS) in den letzten Jahren, über seine Geschichte und über seine Erfolge, die statistisch gewertet und graphisch schön übersichtlich dargestellt werden. Man ersieht daraus, wie durch unermüdliche, auf ein Ziel gerichtete journalistische Arbeit von Jahr zu Jahr größere Erfolge erzielt werden, die darin bestehen, daß über unsere Bewegung immer mehr Aufsätze in der nordwestdeutschen Presse erscheinen. Waren es i. J. 1949 = 113, so brachte 1950 bereits 186 und 1951 sogar 273, d. h. also eine Zunahme von weit über 100 Prozent.

Die Kosten, die EGS im Jahre 1951 verursachte, beliefen sich auf rund 170 DM. Jede vom EGS veranlaßte Veröffentlichung beanspruchte eine durchschnittliche Ausgabe von noch nicht 2 DM. Wenn man die Veröffentlichungen in der Presse

REINHOLD CONRAD MUSCHLER



ELDONEJO DE
LIMBURGER VEREINSDRUCKEREI · LIMBURG · GERM.

200 000

deutsche Leser und Leserinnen lesen diese Novelle, außerdem erschienen Übersetzungen in Englisch, Dänisch, Finnisch, Ungarisch, Italienisch, Holländisch, Schwedisch, und Norwegisch. Dazu jetzt die Esperanto-Ausgabe, die den gleichen Charm und Reiz wie das Original bietet.

Lesen auch Sie diese Novelle von Reinhold Conrad Muschler, übersetzt von Ludwig Goppel - sie wird Ihnen Freude machen.

66 Seiten, 12,5 x 19,5 cm, in Cellophan verpackt.

Broschiert 2.— DM, gebunden 3.— DM
zuzüglich 10% für Porto und Verpackung.

Bestellen Sie in Ihrer Buchhandlung oder direkt bei der

Limburger Vereinsdruckerei GmbH.
Limburg/Lahn

Werben Sie neue Abonnenten
für die **E. P.**

La Ĝusta Vojo

estas internacia, interesa, bonstila Esperanto-revuo por katolikoj, enhavante bone redaktitan tekston pri religio, kristana vivo, tutmondaj sciigoj, Esperanto-movado, amuza parto kaj anoncetoj; aperas monate. Duonjara abono 3,- M aŭ 10 resp.-kup. aŭ -,75 dolaro.

Mendu ĉe **Maria Schöttl**
(13b) München 19, Schulstr. 26/I.
Poŝteekk. 5 78 80 (Maria Schöttl, München) Malnovaj numeroj 7-48 haveblaj por po 20 pf.

ZUR BELEBUNG DER GRUPPENABENDE



Es helpi la Mitglieder zusammenzubalten und bringt Abwechslung und Leben. Zu Hause ab-satzweise vorbereiten lassen, in der Gruppe übersetzen, Wortbildung und Stil erklären und besprechen - das weckt Interesse, besonders weil der Inhalt immer die Spannung wachhält.
Format 12 x 19 cm, 70 Seiten mit 15 Zeichnungen im Text, in schönem zweifarbigem Kartonumschlag, Preis 2,40 DM, zuzüglich 10% für Porto und Verpackung.

Durch alle Buchhandlungen
Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, Limburg

Verda Libertempo 1952

Ferienwochen für Esperantisten, nur im April und Mai, in Bad Ems, im romantischen Tal der Lahn! - Erholung, Ausflüge, Sport. Beste Gelegenheit zur Fortbildung in Esperanto. Voranmeldung erforderlich. Preise von 88,- bis 123,20 DM. Drucksachen auf Wunsch!

L. Funken, Bad Ems (22 b)
Dipl. de E., Del. de UEA.
Villa „Flora“.

Um die Verbreitung des Esperanto auf billiger und leichter Grundlage zu fördern, richten wir einen

Esperanto-Fernlehrgang

ein. Fordern Sie kostenlose Auskunft über Teilnahme-Bedingungen durch

Esperanto-Gruppe, Bonn
Kirschallee 5/II

KAJ POST LA KURSO

?

ĈU VIAJ KURSOJ DAŬRIGAS LERNI?

Alla Internaciaj FERIAJ Kursoj de s-ro L. Friis, Aabyhøj, en

HELSINGÖR

(DANLANDO)

25. 7. — 1. 8. 1952

veturos fervoja Karavano ek de

Hannover

Informojn pefu de Horst Michling, Hannover-Kirchrode
Steinbergstraße 1

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.